

Esperanto en Danio

24-a jarkolekto • n-ro 3 • aŭgusto 2017



Partoprenantoj en la 102-a Universala Kongreso de Esperanto en Seulo

Esperanto en Danio

membroorgano de
Dana Esperanto-Asocio

ISSN 0909-6124

Adreso de la prezidanto:

Peter Wraae

Eremitageparken 17 st, C

2800 Lyngby

☎ 60 70 79 69 peter@wraae.dk

Ĝirokonto de DEA: 8411-41 88 386

UEA-kodo: deaa-t

Kromaj estraranoj:

Finn Østerbæk (kasisto)

Ileana Schrøder (vicprezidanto)

Jens S. Larsen (sekretario)

Bent Jensenius

Arne Casper

Redakcia adreso:

Jens S. Larsen

c/o Trillingsgård, Munkebjergvej 77

2770 Kastrup

☎ 52 64 44 72 eed@esperanto.dk

Presado:

DDFO

Adresŝanĝoj al:

Finn Østerbæk ☎ 24 96 04 45

finnoesterbaek@gmail.com

Represo de artikoloj el EeD estas
permesata kun indiko de la fonto.

Limdato por la venonta numero:

01.11.2017

Enhavo

UK en Seulo.....3
Seulo, vizitinda urbo.....5
Pliaj impresoj el la kongreso.....8

Trejnado – kiel varbi kaj instrui.9
Unesko-Kuriero en Esperanto 13

Junaj danoj en Esperantio.....15
La unua fojo.....16

Kiam la monda paco
komenciĝis en Aars.....18
Miaj travivaĵoj en Nepalo.....23

Amu Poznanon!.....24
Kopenhaga kalendaro.....26

UK en Seulo

La vojaĝo la la ĉi-jara Universala Kongreso en Seulo estis ege longa, kaj mi ne estis la sola kiu rimarkis tion, ĉar oni povis konstati rigardante la liston de partoprenantoj, ke nekutime granda parto de ili alvenis el Azio.

Ĉar mi antaŭe vojaĝis tra Azio, mi estis scivolema sperti kiamaniere la lando funkcias. Mi konstatis ke la sociaj kondiĉoj ne estis tro malsimilaj al niaj, kio en si mem estas impona, ĉar la lando estis ege malriĉa kun tute detruita infrastrukturo post la milito en 1953.

La kongreso ofertis multe da interesaj kunsidoj kaj prelegoj, kulturaj aranĝoj kaj ekskursoj, kiel kutime. Sed okazis kunveno dividita en pluraj partoj, kiu kaptis mian atenton. Ĝin mi nepre deziris ĉeesti, kaj ĝi ne malsukcesis impresi min. Estis la

Internacia Pontkunveno por la Unuiĝo de Korea Duoninsulo



Dr-o SO Gilsu, la iniciatinto kaj organizanto prezidis la kunvenon kun sincero kaj humuro, kaj informis pri la celo de la kunveno. Lia ideo estis kunvenigi 21 esperantistojn de la tuta mondo bone informitajn pri sociaj kondiĉoj, respondi diversajn demandojn pri ilia sinteno kaj kompreno pri la kondiĉoj koncerne pacan reunuiĝon de Norda kaj Suda Koreio, kaj pridiskuti tiun temon panele. Lia konferenca celo estis duobla. La unua estis montri al la politika medio, ke eblas okazigi internacian seminarion pri la temo sen uzo de interpretistoj, kaj ke la esperantista movado interesiĝas tre forte pri pac-estigaj iniciatoj. Ne estis malfacile trovi la panelanojn, ĉar preskaŭ ĉiuj esperantistoj de la mondo samopinias pri la graveco de paco en la mondo.

Ili respondis siatempe plurajn demandojn pri Norda kaj Suda Koreio, kio rezultis en raporto, kiu estis disdonita al la ĉeestantoj. Oni povis tie legi ke grupo de 10 personoj preparis la kunvenon kaj prilaboris la materialon, kiu estis ankaŭ tradukita en la korean. Estis dokumentite, ke la buĝeto de Norda Koreio estas malgranda kompare al pli grandaj landoj kun kiuj ĝi konflikta, sed ĝi havas la plej grandan armean buĝeton, 23,7 % de la tuta enlanda produkto. Kompare la ciferoj de Usono estas 4,3 %, de Rusio 3,7 % kaj Suda Koreio 2,5 %. Rigarde al tio, ne estas mirinde ke mankas nutraĵo al la civitanoj.

Al la kunveno estis invitita la landa vicprezidanto, kaj oni entuziasmiĝis, kiam li diris ke li bedaŭrinde ne parolas esperanton, sed li membriĝis al UEA kiel dumviva membro. Li ĉeestis nur la komencon de la kunveno, sed estas politike ege grave kiuj gravuloj ĉeestas tiajn kunvenojn, kaj ni povis uzi kunvenejon en parlamenta domo. Oni donis multe da informoj, kaj multaj sintenoj estis diskutitaj, oni babilis, debatis kaj argumentis. Al ni partoprenantoj tute klare montriĝis la unika forto de Esperanto, kuniganta grandan grupon da personoj el la tuta mondo en nefermita debato pri grava komuna problemo.

La konkludo de la kunveno ne estis ke la du landoj unuiĝos, eĉ se ĉiuj ĉeestantoj esperis ke tio okazu. Dum la lastaj 5-10 jaroj la du landoj pli-malproksimiĝis inter si, sed rigardante la nunan politikan situacion, multaj homoj samopiniis ke estas tempo klopodi por eviti militon.



Ĉe la Parlamentejo

Peter Wraae

Seulo, vizitinda urbo

En mia loka biblioteko en Brønshøj mi petis la bibliotekiston pri libro kun tia titolo kiel “Ni vojaĝas al Koreio / Suda Koreio / Norda kaj Suda Koreio” aŭ simile. Post persista serĉado ŝi rezignis. Danlingve tia libro ne ekzistas. La lando ŝajne ne havas turisman intereson. Feliĉe, tamen, *Lonely Planet* havis anglalingvan libron pri tiu dividita lando.

UK en Koreio, fora lando kun turbula historio kaj simile turbula politika situacio. Tio ŝajne malkuraĝigas multajn eŭropajn esperantistojn partopreni sed tiu ekzotika lando ankaŭ allogas aliajn, ekzemple junan (en miaj okuloj) francon, loĝantan en mia hotelo, kiu eklernis esperanton samtempe

kun mi (la jaro 2000), sed partoprenis en UK la unuan fojon. Li kutime vizitis naciajn kunvenojn. Bona maniero, laŭ li, ekkoni novajn landojn.

Kiel emeritan lingvo-instruiston du aferoj min surprizis dum mia 10-taga restado en Seulo. La unua estas la ĝenerala manko de regado de la angla lingvo eĉ ĉe junuloj. Mi antaŭe aŭdis ke koreaj gepatroj ofte estas tre fervoraj ke iliaj infanoj lernu la anglan. Kelkfoje tiel entuziasmaj ke ili pagas kirurgan operacion en la lango por atingi pli bonan prononcon de tiu lingvo (operacio kun dubinda efiko krom al la monujo de la kirurgo). Homoj en la stratoj estas tre helpemaj. Mia sperto estas ke la alparolato tuj elprenas la saĝ-telefonon kaj post iom da studado de la ekrano diras “*follow me*”. Tia helpemo povas esti troa sed mi ekhavis la impreson ke la kaŭzo estis ke ili ne sufiĉe bone povis klarigi la vojon al iu loko pro manko de la angla lingvo.

La dua afero kiu surprizis min estis la bona regado de Esperanto de multaj el la 243 koreoj en la kongreso. Ekzemple iu koreo prelegis pri orienta san-



percepto en ege bela lingvo. Iu ĉeestanto, kiu prezentis sin kiel psikologo, klarigis ion en same bona Esperanto. “Tio estas tre interesa vidpunkto,” rimarkigis la preleganto. “El kiu lando vi venas?” – ”Koreio,” li respondis. La gvidanto klarigis ke la du preskaŭ-kolegoj ne konis unu la alian pro tio ke unu estis edukita en Germanio, la alia en Usono.

Mi hazarde partoprenis en la kunveno de ĵurnalistoj TEĴA. Laŭ la statistikoj la membraro de tiu organizo daŭre progresas: 50 membroj en 2008, 137 membroj en 2016. Bedaŭrinde ne estis sufiĉe da ĉeestantoj de la estraro por ke ili povu decidi ion. Eĉ inter ĵurnalistoj Koreio ne estis sufiĉe ekzotika por altiri multajn partoprenontojn.

Antaŭ ol vojaĝi al Koreio mi konatiĝetis iomete kun la korea alfabeto, hangulo. Ĝi estas, laŭdire, la plej facila kaj logika alfabeto en la mondo, inventita en la 15-a jarcento. Oni ofte nomas ĝin la matena alfabeto, ĉar oni povas lerni ĝin en duona tago. Kaj jam antaŭ kelkaj jaroj oni fakte komencis eksporti hangulon eksterlanden. Mi, same kiel aliaj eksterlandaj kongresanoj, sidadis en la tre ampleksa, sed tre efika metroo kaj divenis la nomojn de la venontaj stacioj. Laŭ mi la ebleco skribi planlingvon (Esperanto) per planalfabeto (hangulo) estas, se ne realeca, do tamen interesa ideo. Almenaŭ ĝi povus esti bona respondo al la multegaj kritikoj de eksteruloj ke la zamenhofa lingvo ne estas vere internacia. Kompreneble mi havis grandajn esperojn al prezento de tiu miraklo. Sed, bedaŭrinde, la unua programo estis nuligita kaj la dua estis prezentita de japana profesoro, aŭtoro de libroj pri hangulo. Li komence anoncis sin eterna komentanto de esperanto. Pro tio lia prelego fakte estis tre brila prezentado kun ĉiuj vortoj montritaj sur granda ekrano (bona ekzemplo ke malavantaĝo fariĝis avantaĝo) kaj li uzis la esprimon “lingva miraklo”. Sed pro liaj mankohavaj Esperanto-kapabloj li ne povis respondi demandojn.

Do, esperanto ekzistas – hangulo ekzistas. Ĉu eblas aŭ indas kunigi tiujn du? La respondo, por citi la nobelpremiiton Bob Dylan, “bloviĝas en la vento”.

Eble la koreoj estis tiel okupitaj aranĝi la UK-on ke ili ne havis energion varbi pri sia lingva miraklo, kiu interesis multajn eksterlandanojn (la du programoj havis grandajn nombrojn da vizitantoj). Ni, kiuj aranĝis la UK en Kopenhago en 2011, bone komprenas la situacion.

La lastan programon kiun mi ĉeestis, gvidis Stephanie Cabovianco, 28-jarulo el Argentino, kiu reĝisoris la kongresan temon “Turismo kaj evoluo: Vojoj al daŭripovo”. Tiu temo kongruas kun la temo de UN kiu deklaris 2017 jaro de preskaŭ la sama titolo. Gratulojn al Stefanie pro ŝiaj klopodoj.

Mia restado estis bona mikso de kongreso kaj turismado. Seulo, kun 10 milionoj da loĝantoj, duoblo de tiu de Danio, estas ege interesa urbo. Laŭ mi, ĝi estas je la nivelo de Londono, Parizo, Novjorko kaj aliaj samgrandaj urboj. Tamen, eĉ en la veraj turismejoj kiel *Seoul Tower* kaj *the Village* oni vidas malmultajn ne-azianojn. Dise en la urbo staras junaj homoj vestitaj en belaj ruĝaj skolto-similaj uniformoj kaj per taŭga angla lingvo helpas al la malmultaj turistoj. Mi sentis min tre sekura ĉie kaj ĉiam. Laŭ mi, Seulo estas kiel ne-malkovrita perlo – ĝi estas unu el la plej vizitindaj urboj en la mondo.

Bent Jensenius

Pliaj impresoj el la kongreso

- Tien kaj reen ni flugis per rusia kaj korea kompanioj, ŝanĝante aviadilon en Moskvo. Agrabla vojaĝo. Nia hotelo situis en promena distanco de la kongresejo, kaj ni loĝis en la 8-a etaĝo. Sur la muro ĉe la fenestro estis solida ringo-ŝraŭbo muntita. En antaŭa monŝranko ni trovis ŝnuregon.
- Ni kongresis en internacia universitato. Ni povis havi manĝojn en la studenta kantino. Per monbileto ni ricevis paperpecon, koloritan por vegetara, malgranda aŭ ordinara porcio. La manĝo konsistis ĉefe el rizo, legomoj en spicita saŭco kaj iom da viando.

- Trafiko: Granda semafora vojkruciĝo funkciis tiel, ke en ĉiuj 4 stratoj la trafiko estis haltigita. Tiam eblis ankaŭ diagonale transiri. La verda lumo signalis, kiom da sekundoj restis al ni piedirantoj.
- Mi celis ekzameniĝi, tial mi estis inter aliaj homoj. 4 horojn mi devis sidi por la skriba tasko. - Dum la ekskurso mi vizitis la landlimon al Nord-Koreio. Ni estis en konstruaĵo kun panoramo, de kie ni povis vidi du flagojn longe for. Ni iris en subteran tunelon, kiu estis pli ol unu km longa, tiom voluma, ke ĝin povus traveturi malgranda aŭto.
- La homoj estis afablaj kaj helpemaj. La koreoj dorlotis nin. La kongresa sako estis bonkvalita kun reklamo por tiu internacia universitato kaj aliflanke estis nia kongresa simbolo. En ĝi estis alia saketo, taŭga por sia pasporto. Ni ricevis bonan globkrajonon, pagitan karton por la publika trafiko kaj tukon. Dankon al Koreio kaj UEA pro bela kongreso.

Jytte Sunekær

Trejnado – kiel varbi kaj instrui

Intensa kaj bone preparita programo atendis la partoprenantojn en la 35-a Seminario pri Aktivula Maturigo (AMO) nun okazanta en la ekstrem-okcidento de Svislando en la vilaĝo Les Brenets kune kun la tuj apuda franca vilaĝo Villers-le-Lac. La AMO-programo per tio aldonas novan landon, Svislandon, al sia dekomence kvar-kontinenta repertuaro. Ĝis aprilo 2017 la AMO-programo neniam traktis specife edukajn temojn, nun ĝi tion faris dufoje ene de kvin semajnoj. La realigo de la programo estis en la manoj de Katalin Kováts (prizorganto de edukado.net), loka instruistino Mónika Molnár kaj Mirejo Grosjean. Loĝistikon kaj varbadon prizorgis Mirejo Grosjean, la prezidanto de ILEI.

La aranĝo estas, laŭ nia scio, nur la dua solstara seminario organizita ĝis nun – ĝi pravas, ke tiu seminaria formo estas vivigebla, se ekzistas forta

loĝistika bazo en aŭ apud la AMujo. Ĉi tiu seminario altiris 16 partoprenantojn, el Danlando, Francio, Germanio, Hungario, Nederlando kaj Svislando. Kvin-persona grupo el Danlando AMumas helpe de subteno de projekto kadre de la eŭropa programo Erasmus+. Sur la foto videblas pluraj danoj:



Perfekta frusomera vetero dotis la kvartagan seminarion. En la unua tago, la 25-a de majo, la seminarianoj ricevis gvidatan ekskurson tra la nuntempe haveblaj rimedoj por nia instruado; bilarda tablo plenegis je lerniloj, legolibroj, antologioj kaj didaktikaj libroj, kune kun la alirebla reta apogo grava por ilin bone uzi. Inter la montraĵoj estis *La Manlibro pri Instruado*, konciza kompilaĵo de dudeko da aŭtoroj, kies kvara reeldono estas nun progresigata. Sekvis diskuto, kiuj lerniloj estas konvenaj por montri al lernejestro aŭ edukaj instancoj kadre de provo starigi Esperanto-kurson. La nombro de tiaj verkoj estas tre limigita – la plej evidenta kandidato estas la lernpakaĵo de Josias Barboza el Brazilo (2008), kiu konformas al la nuntempa aliro al lingvo-lernado rekonata ankaŭ de neesperantistoj. La tagon

oni fermis per realigo de rolludo, en kiu haste preparita entuziasmulo devas provi prezenti Esperanton por iuspeca instruado en lernejo. La decidantoj estis la direktoro kaj financa ĉefo de la lernejo, kune kun diversaj instruistoj, nelaste de aliaj lingvoj. La rolpriskriboj estis disdonitaj tiel, ke ĉiu rolanto konis nur la propran rolon – sekve la argumentoj levitaj venis kun surpriz-elemento al la aliaj rolantoj. La posta diskuto montris, kiom malfacile estas argumenti konvinke antaŭ skeptika publiko, kaj la graveco de rigora kaj saĝa pretigo de la argumentoj kaj materialoj.

En la sekva tago, la mateno estis dediĉita grandparte al la graveco de akceptataj ekzamenoj kaj la rolo de la Komuna Eŭropa Referenckadro (KER) de la Konsilio de Eŭropo – eŭrop-devena programo tutmonde uzata. Kreskas postuloj pri lingvokono por eniri universitatojn aŭ por ricevi iliajn diplomojn. La postuloj en Hungario estas aparte rigoraj, tiel ke ĉiujare ĉirkaŭ tri mil studentoj trapasas ekzamenon en Esperanto, kiu estas la tria plej elektata fremda lingvo. Per tio 200 instruistoj financas sian vivon parte aŭ tute.

Sekvis praktika ekzerco, ĉiu ricevis la takso-tabelon de la KER-sistemo, kaj per ĝi devis taksu kaj marki sian lingvo-nivelon per la laŭŝtupa mem-taksilo en iu ne tro regata fremda lingvo. Valora ekzerco por konigo de la unuopaj ŝtupoj estis realigata per la tasko vicordigi kartojn de kriterioj tiritaj el la taksila tabelo. Konkludo pri la temo: oficialeco de ekzamenoj gravegas por la statuso de nia lingvo kaj niaj pledoj enkonduki oficialajn kursojn.

Prezentita ankaŭ estis la nuntempa traktado en projekto de ALTE – la Asocio de Lingvo-Testantoj en Eŭropo, en kiu UEA membras, por difini anekse al la KER-ekzamenoj, postulojn, studplanojn kaj ekzamenojn T1 kaj T2; nome ekzamenoj por atesti lingvo-instruajn kapablojn. Intertempe movadanoj agas mem kadre de universitatoj – siatempe en ELTE en Budapeŝto (HU), nun en UAM en Poznano (PL).

Praktike kaj inspire

La partoprenantoj en AMO-LIMA (la 35-a seminario en la serio) havis okazon ne nur diskuti edukajn temojn, sed ankaŭ sperti duontagan viziton al lernejo, kie Esperanto formas integran parton de la lernprogramo.

La lernejo troviĝas en La Chaux-de-Fonds, urbo kun granda movada historio. Ĝi estas eta privata lernejo, kun nur 24 lernantoj, inter la aĝoj de 6 kaj 16 jaroj. Ĝia pedagogio sekvas la ideojn de la franca pedagogo Célestin Freinet.

Komence de la vizito, la seminarianoj povis trairi la lernejon kaj admiru ekspoziciojn kaj vidi resumajn murafiŝojn pri la studitaj temoj. La studtago ne dividiĝas en tradiciajn studtemojn, sed kunigas ilin por esplori kaj studi diversajn elektitajn temojn. Anstataŭ direktoro, la decidadon kaj organizadon de la lerneja vivo gvidas “la triopo”, t.e. la lernantoj, la instruistoj kaj la gepatroj. Ĉi tie Esperanto estas tute normala studobjekto, ne nur ĉar ankaŭ Freinet siatempe jam uzis ĝin, sed ankaŭ pro personaj konvinkiĝoj. Sekvis klarigoj pri la lernejo, fare de la seminaria gvidanto Mónica Molnár, kiu estas instruistino en tiu lernejo “La Granda Ursino”.

La programo en la lernejo venis al la fino, kiam en du grupoj la seminarianoj kune ludis kun la deko da lernantoj, kiuj konsentis kaj povis reveni en la feritaga vendredo de longa semajnfino. Unu grupo kartludis, la alia demand-ludis. Tiel, la seminarianoj povis mem sperti la parolan kapablon kaj lerton de la lernantoj. Des pli mirige, ni fine de la vizito en la agrabla lerneja ĝardeno, kun urbe aprobata arbodomo, kiun la lernantoj kaj instruistoj kune konstruis, eksciis, ke kelkaj el tiuj lernantoj eklernis la lingvon antaŭ nur ok monatoj. La tuta vizito konvinkis nin pri la lernemo de la lernantoj, unuflanke por Esperanto, aliflanke por ĉiu parto de la studplano. Seminarianoj spertis modelon, vere sekvindan en aliaj mondpartoj.

Stefan MacGill

Unesko-Kuriero en Esperanto



Unesko-Kuriero estas la oficiala revuo de Unesko (Organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj por Edukado, Scienco kaj Kulturo). Ĝi ekaperis en 1946. Kiel grava komunikilo por disvastigi la ideojn de Unesko kaj promocii la interkulturajn dialogojn, la revuo iam ludis gvidan rolon por disvolvi la misiojn de Unesko en la kampoj pri kiuj ĝi respondecas.

Antaŭ jaroj, multaj esperantistoj alvokis ke Unesko eldonu ĝin ankaŭ en Esperanto. Amaso da retaj mesaĝoj bombe ĝenis la funkciulojn de Unesko, kiuj kelkfoje re-

spondis: “se UEA aŭ iu alia pretas financi ĉion, Unesko pretas doni permeson al Esperanta eldono de Unesko-Kuriero.” Bedaŭrinde la revuo devige ĉesis ekde 2012 pro manko de financaj rimedoj. Ekde tiam malaperis la penado ĉe la esperantistaro.

En majo 2017, post reapero de la 76-paĝa plenkolora Unesko-Kuriero en formato A4, UEA tuj lanĉis projekton pri eksperimenta eldono de Unesko-Kuriero en Esperanto, laŭ iniciato de la UEA-komitatano Trezoro Huang Yinbao, direktoro de Esperanto-Centro Ora Ponto Ĉinio. Dank’ al kortuŝa kunlaboro de 36 tradukintoj kaj provlegintoj en 23 landoj, kaj financa subvencio de Esperanto-Centro Ora Ponto Ĉinio, la 1-a numero de Unesko-Kuriero en Esperanto estas eldonita. La du versioj en Esperanto estas samaspektaj kiel la UN-lingvaj versioj.

La papera versio (ISSN 2521-7356) estos aĉetebla ĉe la libroservo de la 102-a UK kaj poste daŭre ĉe la Libroservo de UEA. La reta versio (ISSN 2521-7364) estas senpage elŝutebla ĉe UEA-retejo.

Jen la komentoj de komitatano Trezoro pri la iniciato:

En nia Esprantio vere ne mankas legaĵoj. Multaj legaĵoj estas pli interesaj ol la artikoloj en Unesko-Kuriero. Tamen malmultas ilo montri al la publiko ke Esperanto bone vivas kaj vere valoras. La Unesko-Kuriero en Esperanto ligas Esperanton al Unesko. Ĝi ebligus rimarkigi al Unesko-funkciuloj ke Esperanto vivas, eĉ helpas al Unesko. Ĉar en la ŝranko de Unesko videblos ilia gazeto en nia lingvo Esperanto.

Ĝuste pro tio, ni havas kialon komuniki mesaĝe kaj telefone kun ili. La komunikado certe bone impresos ilin. Tiamaniere ni povus influi Uneskon finfine, paŝon post paŝo.

Unue, post unujara eldonado, ni povus peti ke Unesko alŝutu la retan Esperanto-version al la Unesko-retejo por faciligi la legadon. Post ilia akcepto, amaso da elŝutoj el Unesko-retejo povus rimarkigi al Unesko ke la legantoj de la Esperanto-versio troviĝas en pli ol 130 landoj! Ĉu la ĉinlingva, ruslingva versio povus atingi 100 legantojn en landoj? Tute ne eblus. Ni ne postulos, ne plendos, sed ni nur helpos al Unesko.

Post dujara eldonado, ni povus peti ke Unesko permesu al ni esperantigi la retpaĝon, kie niaj legantoj multfoje elŝutus la Esperanto-version. Ni ne postulos, ne plendos, ni daŭre helpos.

Tria paŝo. Ni invitu funkciulojn de Unesko ĉeesti nian kongreson, kaj propraokule vidu la unikan grandan kongreson kun mil partoprenantoj el 80 nacioj, sen interpretistoj. Ni ne postulos, ne plendos, ni daŭre helpos. Unesko-funkciuloj finfine vidos ke la Esperanta versio de Unesko-Kuriero estas disdonita al kongresanoj, vidos ke Esperanto bone funkcias.

Se esperantistoj povus UN-lingve skribi mesaĝojn al redakto de Unesko-Kuriero por esprimi dankon kaj interesiĝon al Unesko, menciante nur unu frazon "... leginte Unesko-Kurieron en Esperanto eldonitan de UEA ...", tio certe helpos al konsciigo de nia labora plano. Tamen nepre ne faru proponon, postulon al Unesko, kio povus ĝeni ilin. Ni povos fari proponon kaj postulon nur post kelkjara eldonado.

Trezoro Huang Yinbao

Junaj danoj en Esperantio



Meze de julio mi kune kun tri aliaj danaj esperantistoj, nome Tobias Nowak, Kent Schneefeldt kaj Rolf Andersen, partoprenis Someran Esperanto-Studadon (SES) 2017 en la belega, historia urbo Banská Štiavnica, Slovakio. SES, eĉ se ne celite tiel, estas ĉefe junulara kursara renkontiĝo. Ankaŭ Tobias verkas artikolon pri siaj spertoj dum SES, sed por ke ambaŭ artikoloj estu interesaj kaj malsamaj, la mia temo pri la kursaro kaj la edukaj perspektivoj de la renkontiĝo, dum tiu de Tobias temo pri la aliaj, eksterkursaj flankoj de la renkontiĝo.

Post matenmanĝo je la 9-a horo okazis ĉiun tagon ĝis la 13-a horo kurso de Esperanto dividita en nivelojn laŭ KER, la Komuna Eŭropa Referenckadro por lingvoj. Tutkomencantoj ĉeestis kurson je la nivelo A1 kaj la plej spertaj geesperantistoj ĉeestis kurson, iom neoficiale, nomatan C1-Ĉ2. Tiamaniere eĉ tiuj kiuj jam bonege regas la lingvon povis pliboniĝi kaj lerni pri diversaj temoj. La malpli altnivelaj kursoj fokusiĝis ĉefe pri la bazaj konceptoj de Esperanto, la meznivelaj pri uzado de la lingvo, t.e. paroligi la progresantojn, kaj la altnivelaj porprogresintaj kursoj pri la “marĝenaj eroj de Esperanto”, kiel nomis sian prezentaĵon la pol-rusa C1-instruisto Konstantin Tiĥomirov.

Ĉi tiu divido en grupojn de la kursanoj tamen ne signifas ke homoj de malsamaj niveloj ne kune parolis. Post la kurso, dum tagmanĝo kaj la ceteraj programeroj de la tago, okazis babilado kaj interkonatiĝo inter ĉiuj niveloj – tute ne malofta vido estis tutkomencanto paŭzanta inter ĉiu vorto diskutanta kun sperta 60-jaraĝa geesperantisto.

Laŭ mia takso, tamen, la plej interesa, kaj verŝajne plej grava, parto de la semajno estis la klara ŝanĝiĝo de ĉiuj partoprenantoj. Tutkomencantoj iĝis komencintoj, progresantoj iĝis progresintoj kaj tiel plu – tiuj kiuj spertis gravajn malfacilaĵojn parolante eĉ pri la, koncedite iom elreviga, tagmanĝo post semajno povis plej ofte bone paroli pri tiaj spertoj. Unu el la faktoroj kiuj kaŭzas ĉi tiun grandan plibonigon estas la tre bone komponita mikso de kaj lernado kaj libera parolo. Malkiel en kutimaj lernejoj, la studantoj ne ĉiutage iras hejmen post longa, laciga ofte eĉ enuiga tago de lernado feliĉe forgesante la ĵuslernitajn aferojn. Kion oni lernis, tio estas tuj uzata en realvivaj situacioj. Pro tio la lernantoj ne sentas sin malkontentaj kaj sencele lernantaj kiam la celo de lernado ne estas malklara afero aparta kontrastanta al la instruado mem.

Mi esperas ke multaj aliaj homoj ekhavos la belegan sperton partopreni Someran Esperanto-Studadon en la venonta urbeto elektita de la Slovaka Esperanto-Junularo (SKEJ).

Mia Nordentoft

La unua fojo

La 15-an de julio je la 5-a horo matene mi troviĝis en la flughaveno de Kastrup, preta por iri en Esperantan aventuron, provizite per 3 novaj danaj Esperanto-konatoj, scio pri Esperanta gramatiko, preskaŭ neniuj buŝa kono de la lingvo, sed kun multege da esperantista fidopleno.

Mi ne kuraĝis provi mian lingvoscion ĉe miaj novaj danaj konatoj, sed preparis min kiom mi nur povis por plene fordoni min al Esperanto tuj ĉe mia alveno al SES.

Mi insistis paroli en Esperanto kiam ajn eblis, kaj frazoj kiel “malrapide bonvolu” kaj ”mi ne komprenas” estis ofte uzataj, kaj la vortaro eĉ pli. Sed Esperanto eniris malrapide, sed certe, pli kaj pli mian cerbon, kaj mi povis rimarki grandan diferencon de mia scio de tago al tago.

Mia unua impresado de la Esperanta mondo estis grupo da personoj kun diverseco kaj bona etoso, kio daŭris dum la tuta periodo de la kurso. La unua vespero estis organizitaj diversaj ludoj por ke ni interkonatiĝu, kio mi opinias ege bona maniero eniri en nova komunumon.

Preskaŭ ĉiutage matene estis lernado, posttagmeze liberaj agadoj kaj vespere diversaj sociaj aktivadoj. Mi estis bonŝanca havi ege kompetentan instruiston en mia A2-klaso. Mi sentis min rapide bonfarta en la Esperanta kulturo kaj estis tre ofta partoprenanto ĉe la balo, kune kun duono de la aliaj partoprenantoj tuj ĉe la unuaj tonoj de la koncertoj.



Mi anoncis min por instrui mian sporton – akrojogo – la antaŭlastan tagon de la seminario. La suno brilis kaj anoncis sin 15 personoj por sperti la defion. Mi estis bonŝanca ke unu persono helpis min prepari kelkajn frazojn en esperanto, kiujn mi povis uzi dum la instruado. Ne estis tute perfekte, sed mi sukcesis instrui en Esperanto, kio certe sukcesis ankaŭ pro la pacienco de la esperantistoj.

Estis agraba kaj instrua sperto por mi renkonti la internacian Esperanto-komunumon, kaj mi antaŭvidas mian partoprenon en mia venonta Internacia esperanta aktiveco.

Kiam la monda paco komenciĝis en Aars

En la urbeto Aars (en Himmerland, norda Jutlando) ĉi-somere okazis ekspozicio pri la loka Esperanto-historio. Ejnar Hjort el Aalborg disponigis al ni artikolon pri ĝi el la loka gazeto, kaj ĉi tie vi povas legi ĝin en Esperanta traduko.

De Knud Labohn og Martin Damgaard (foto).

Dum milito minacis Eŭropon en la 1930-aj jaroj, unu farbista mastro provis survoĝigi siajn urbon kaj mondon al la paco pere de la mirakla lingvo Esperanto.

Hitler armadis sin. La ungegoj de Stalin sange ŝiris milionojn da sortoj en Sovetio. Sed en Aars Frede Poulsen surmetis sian molan ĉapelon kaj eliris por trovi novajn amikojn.

La jaro estas 1936 kaj la loka farbista mastro volis iri al Parizo por partopreni en granda internacia Esperanto-kongreso. Ĉar kvankam la finon de la 30-aj jaroj ni plejparte memoras kiel antaŭtakton de la dua mondmilito, multaj tiutempe provis survoĝigi la mondon en paca direkto.



La lingvo kreita por alhelpi pacon kaj interkompreniĝon sufiĉe multe furoris en Aars. Peer Poulsen (maldekstre) havas multajn memorojn pri la granda engaĝiĝo de lia patro Poul pri Esperanto. Thorkild Nielsen (dekstre) kunmetis la ekspozicion kun granda helpo de Peer Poulsen.

Tiurilate Esperanto ludis gravan rolon. Ankaŭ en Aars. Ĉar Esperanto estis lingvo sen oblikvaj anguloj kaj torditaj kromvojoj. Kreita por sufiĉe ordinaraj homoj, kiuj ne bezonis grandan edukon aŭ monujon por povi partopreni.

Elpensita 50 jarojn antaŭe por ĝuste la celo, pro kiu eliris Frede Poulsen: por krei amikecon kaj komprenemon trans landlimojn.



En la ekspozicio multaj demandas ĉu ne mortis Esperanto. La respondo estas ke ne, kion pruvas ĉi tie unu el la lastaj novaj Esperanto-magazinoj.

Danĝera kompreno

– Ankaŭ “danĝera lingvo” ĝi estis nomata de Hitler kaj Stalin. Ili ĝin malpermesis, ĉar alie ili ne povus kontroli la kontaktojn inter siaj civitanoj kaj eksterlandanoj. Sed estis granda interesiĝo pri ĝi inter ordinaraj homoj, rakontas historiisto Thorkild Nielsen.

Estas li kiu trovis la preskaŭ forgesitan interludon en la historio de Himmerland kaj elportis ĝin el la kaŝejoj. Tio okazis en intima kunlaboro kun la filo de Frede Poulsen, Peer, kiu trovis multajn Esperantaĵojn kiam li faris ordon post la morto de sia patro.


Aars sekvis la modojn

El tio rezultis ekspozicio kiu ĝis la 7-a de julio estas vizitebla en la preĝeja centro de Aars.

– Oni povas legi ĉe iuj historiistoj ke Esperanto ekzistis nur en la grandaj urboj. Sed tio do ne veras, videble. Mi ŝatas povi montri ke oni pli sekvis la modojn en urboj kiel Aars ol oni opinias en la establo. Aars ja estis stacia urbo, kaj estis ĉi tie ankaŭ ĵazdancemuloj. Ankaŭ tion oni ne opinias en Kopenhago, diras Thorkild Nielsen.

En la preĝeja centro oni interalie povas vidi fotojn el Esperanta festo en la hotelo de Aars en la 30-aj jaroj. Ĝi montras salonon plenplenan de okupitaj tabloj. Kvankam la festo estis ankaŭ por geedzoj, la foto atestas ĝeneralan subtenon, kiun nur la plej grandaj asocioj de Aars povas prezenti hodiaŭ.

– Tiutempe estis nur 350 domoj en Aars. Do Esperanto vere okupis spacon en la urbo, rakontas Thorkild Nielsen.



Lingvo malfermis pordojn

Strikte formale tamen nur Frede Poulsen estis membro de la Dana Esperanto-Asocio en Aars, trovis Thorkild Nielsen.

– Sed al la plej multaj homoj tio ne gravis. Por kio utilis al ili membreco?

Ne vere por io, li klarigas.

Sed se oni sciis la lingvon, ĝi malfermis eksterordinare multe da pordoj tiutempe. Nelaste kiam oni loĝis en Himmerland, longe for de la plej proksima landlimo.

La muroj de la ekspoziciejo portas multajn ekzemplojn de tio. Jen Peer Poulsen faris artaĵon el la poŝtkartoj, kiujn patro Frede ricevis el landoj de la tuta mondo dum tiuj jardekoj.



Ŝajne eĉ Tinĉjo parolas Esperanton.

Parolante Esperanton oni ankaŭ havis aliron al ia neformala frataro. Venante al fremda urbo kaj bezonante tranoktejon, oni povis simple peti renkonton kun la plej proksima esperantisto. Tiam oni preskaŭ garantiie havis kuŝejon por la nokto.

Kulturo kiun la nuntempaj esperantistoj pluportas en mondo kiu multe pli internaciigis. Ke la farbista mastro iris al kongreso en Parizo oni rigardis kiel tiel grandan novaĵon, ke ĝi estis vaste preparolita en la gazeto de Aars. Al Frede Poulsen ankaŭ estis travivaĵo eksterordinara por Aars-ano.

– Ja estis flirtantaj flagoj kun svastikoj ĉe la urboj kaj ĉe la dana-germana landlimo. Mi multon aŭdis pri tiu vojaĝo, kvankam mi ne estis naskita tiam, rakonas Peer Poulsen hodiaŭ.

Frede Poulsen revenis kaj certe vaste rakontadis pri la vojaĝo malproksimen. Sed kvankam paco kaj konkordo estis gravaĵo por li kaj la plimulto de liaj samurbanoj, tio kiel sciante ne sufiĉis post septembro 1939.

En 1949 li tamen denove elprenis la molan ĉapelon, kravaton kaj jakon kaj faris la vojaĝon al nova Esperanto-kongreso. Kaj ĉi-foje ĉiuokaze ne finiĝis en monda milito.



Iom formale, sed fidante la estontecon. La Esperanto-festeno en Aars estis lumradio en tempo glitanta la mondmilita katastrofo.

Miaj travivaĵoj en Nepalo



Mi tre ŝatas Nepalon, landon kiun mi plurfoje vizitis kaj planas reviziti estonte. Mia unua fojo estis en 2011, iom post mia lernado de Esperanto. Ĉe mia amiko kiu helpis min lerni la lingvon, mi ricevis broŝuron pri Esperanta renkontiĝo en Nepalo okazonta post kelkaj monatoj, kaj mi tuj aliĝis. Parto de la renkontiĝo estis monta migrado, kaj ĝuste tiu parto de la renkontiĝo allogis min, kaj mi pensis ke mia lingvoscio permesos al mi ĉeesti.

Mi antaŭe ofte migradis en la norvegaj montaroj kaj uzis la kabanajn de la norvega turista agentejo, kio estas sistemo simila al tiu uzata en Nepalo. La renkontiĝo estis internacia kaj alvenis homoj de la tuta mondo, sed kompreneble la plejparto el ili estis nepalanoj. Mia ne tute forta lingvoscio estis nenia baro. En la grupo oni rimarkis multe da solidareco kaj senton ke en tiu forumo ni ĉiuj estis samrangaj. Mi sentis esti akceptita kiel amiko.

La plej granda parto de la nepalaj esperantistoj devenas de larĝa parto de la civitanoj, kaj ili povus same bone simili al mia dana amikaro. La plejparto estas instruistoj, kaj ĉiuj estas edukitaj, sed kelkaj rakontis al mi ke iliaj gepatroj vivas simplan vivon en montaraj vilaĝoj. Duonjaron poste estis UK en Kopenhago kaj oni demandis min, ĉu mi povus inviti kelkajn nepalanojn loĝi ĉe mi kelkajn semajnojn. Mi tuj jesis kaj gastigis 5 nepalanojn dum unu konato.

Post la unua fojo mi ĉeestis la renkontiĝon preskaŭ ĉiun jaron, ofte dum longa periodo. Mi loĝas alterne ĉe pluraj familioj kaj amikiĝis pli profunde og eniras en ilian kulturon kaj havas senton ke mi “apartenas” tie. Komence estis iom malfacile “legi” iliajn sociajn regulojn. Tio postulas koncentritan atenton, sed post unuopaj eraroj ĉio iris glate. Ili rakontis pri sia vivo kaj mi povis paroli ankaŭ pri pli tiklaj aferoj, ekzemple kiamaniere oni trovas sian partneron kaj kiel estas vivi pluraj generacioj kune. Ekzistas grandaj diferencoj inter niaj kulturoj, kaj estas fascine kaj pliriĉige identiĝi en tiel malsimilaj kondiĉoj.

Mi planas forvojaĝi denove al Nepalo venontjare, antaŭvidante kun ĝojo renkontiĝi kun miaj amikoj kaj denove sperti la belegan naturon en la montaro.

Peter Wraae

Amu Poznanon!

Ene de mallonga tempo finiĝos la aliĝperiodo al la trijara kursaro de la Interlingvistikaj Studoj en Poznan, Pollando. Aliĝis jam dudeko da personoj el diversaj mondpartoj kaj landoj. 9 el la kandidatoj petis studstipendion kaj ankaŭ pluraj aliaj bezonos subtenon por dum tri jaroj financi vojaĝojn, vivkondiĉojn kaj aliajn elspezojn. Ni bezonas jare plurmil eŭrojn.

La usona fondaĵo ESF (*Esperantic Studies Foundation*) duobligas ĉiun tiucelan donacon. ESF jam de jaroj finance subtenas la Interlingvistikajn Studojn en la Universitato Adam Mickiewicz en Poznano (Pollando). Ĉi-jare ESF planas donaci pli ol antaŭe kaj instigi aliajn homojn fari la samon. Por helpi realigi tion, ESF lanĉas kampanjon “AMU Poznanon”, laŭ kiu la fondaĵo duobligos viajn donacojn al tiu unika programo: por ĉiu eŭro (dolaro, eno, realo, ktp.) donacita de esperantistoj al la Interlingvistikaj Studoj en Poznano, ESF aldonos samvaloran donacon, tiel ke la komune kolektita sumo atingu \$5000! Do, se vi donacos 10 eŭrojn kadre de tiu ĉi kampanjo, ESF donacos pliajn 10 eŭrojn, ktp. Do, anstataŭ la planitaj \$5000 nur de ESF, la programo povas ricevi aldonajn \$5000 pere de VIA donaco, duobligita de ESF. Tiel, via donaco al la kampanjo “Amu Poznanon” helpos subteni tiun unikan programon per \$10 000, entute.

“Amu tiun ĉi universitaton! Ĝi estas unika, ĉar ĝi proponas interlingvistikajn studojn, pri kio ne povas fanfaroni multaj aliaj landoj” (gvidanto de la programo, profesoro Ilona Koutny).

“Nur en tiu programo eblas klerigi niajn aktivulojn ĝis la grado, kiun oni povus atendi de la homoj de 21a jarcento, kiuj ambicias ŝanĝi la mondon” (UEA-prezidanto kaj ESF-estrarano Mark Fettes).

“Tiu kurso montris al ni ke Esperanto estas fenomeno multe pli riĉa ol ni povis imagi” (Ivan Colling, Brazilo, esperantisto de 27 jaroj kaj docento pri inĝenier-arto de universitato de Paranao kaj studanto de la programo)

Vi povas donaci rete (esperantic.org/amu) aŭ per UEA-konto: esfo-p (donacante per UEA, skribu al financoj@co.uea.org kaj nepre menciu “por AMU Poznanon”, kaj samtempe sciigu al admin@esperantic.org pri la farita donaco) – en ambaŭ kazoj ESF faros egalkvantan donacon. Interlingvistikaj Studoj kaj ESF esperas je via partopreno kaj via malavareco... duobligita!

[*edukado.net*]

Kopenhaga kalendaro

“Konversacia Esperanto-Klubo” kutime kunvenas en la Kulturdomo, Tomsgårdsvej 35, **lunde je la 19.00 horo en ĉambro B**. Eniru tra la malantaŭa enirejo ĉe la parkejo. Premu butonon en la dekstra muro por malfermi la pordon aŭ voku 20 27 08 39 aŭ 60 70 79 69.

Sabate 19. aŭgusto je la 12-a horo en KONGENS HAVE

PARALELA UNIVERSO.

Tiu koncepto komenciĝis lastjare en Norda Ameriko. Oni renkontiĝis samtempe en 25 diversaj urboj. La celo estas ke ĝi evoluu al mondskala okazaĵo. Krom bona maniero renkontiĝi ĝi estas bona okazaĵo por reklamo al la ekstera mondo.

4. septembro: Universala Kongreso en Koreio. Partoprenintoj rakontas.

11. septembro: Himalaja Renkontiĝo. Peter kaj Zita rakontas pri sia restado en Nepalo kaj montras multajn belegajn bildojn.

18. septembro: Studgrupo. Gvidas Betty

25. septembro: **Pri UEA kaj ĝia strukturo.**

Kion faras komitatanoj, estraranoj, delegitoj, la Centra Oficejo kaj la ĝenerala direktoro.

Ĉu eblas kompari UEAn kun landa registraro?

Gvidas Ileana kaj Peter (aliaj komentoj bonvenas).

2. oktobro: **Wikipedia**.

Ni provas novan projekton/programeron kaj ĉiuj estas ege bonvenaj partopreni ĈU AKTIVE ĈU PASIVE.

Unue ni parolas pri nia opinio kaj uzo de Wikipedia.

Poste ni pripensas diversajn temojn kiuj ne ankoraŭ troviĝas en la Esperanta Wikipedia: vidindaĵoj kaj famaj personoj en Danio, ekzemple.

Ĉar tiu programero estas por ni tute nova, ni devas palpe serĉi la vojon. Eble ni estos en telefona/skajpa kontakto kun iu spertulo.

9. oktobro. Babila vespero. Venu babili pri ĉio aŭ nenio.

16. oktobro. Pro la **aŭtuna ferio** ne okazos kunveno.

23. oktobro: Studgrupo. Gvidas Betty.

30. oktobro: Tiuj estas niaj (Esperantaj) vivoj. Jan kaj Lene Niemann respondas demandojn de la ĉeestantoj.

6. novembro. **Wikipedia**. Daŭrigo de la unua programero de tiu temo.

13. novembro. Babila Vespero. Venu babili pri ĉio aŭ nenio.

20. novembro. Studgrupo. Gvidas Betty.

27. novembro. Lumbild-prelego pri Latvio. Gvidas Bent.

4. decembro. **Wikipedia**. Daŭrigo de la dua programero de tiu temo.

Sabate 9. decembro: ZAMENHOFA FESTO.



***La studintoj de SES kun siaj
ekzamen-atestiloj (vidu p. 15-17)***

***La danaj
partopenantoj
en UK Seulo
(vidu p. 3-9)***

